

Kial Resti Morale Pura

Boyd K. Packer

Prelego donita dum la Ĝenerala Konferenco, aprilo 1972

Sendube ĉiuj ni konscias pri la fakto, ke ĉeestas tre forta spirito dum ĉi tiu sesio de la konferenco ĉi-matene. Nur malofte, mi supozas, mi tiom deziris la subtenan povon de la Spirito, kiom nun, dum mi pritraktos tre delikatan kaj malfacilan temon.

Estas multe da gejunuloj en la ĉeestantaro hodiaŭ. Estas al ili, speciale al tiuj inter la aĝoj 12 kaj 21 jaroj, al kiuj mi parolas. La temo devas esti tre interesa al vi - Kial resti morale pura.

Mi pritraktas ĉi tiun temon kun granda respektemo. Ĉi tio eble surprizas kalkajn; ĉar ĉi tiu temo estas la plej priparolata, plej prikantata kaj plej priŝercata temo el ĉiuj temoj. Preskaŭ ĉiam ĝi estas pritraktata malice.

Mi intencas respekteme paroli por ke mi ne ofendu per parolado pri ĉi tiu tre delikata temo.

Gejunuloj, mia mesaĝo estas tre grava al vi. Temas pri via estonta feliĉo. Eble tio, kion mi diros, ŝajnos nova al tiuj, kiuj ankoraŭ ne legas la Sanktajn Skribojn.

En la komenco, antaŭ via surtera naskiĝo, vi loĝis kun nia Ĉiela Patro. Li estas reala. Li efektive vivas. Estas tiuj sur la tero, kiuj atestas pri Lia ekzisto. Ni jam aŭdis Liajn servantojn tion fari dum ĉi tiu konferenco. Li vivas kaj tion mi atestas.

Li konis vin tie. Pro tio, ke li amas vin, Li sopiras vian feliĉon, kaj vian eternan progreson. Li volas, ke vi libere elektu kaj kresku per la povo de via libera volo por ke vi fariĝu kiel Li estas. Por tion fari, estis necese, ke vi forlasu Lian ĉeeston. Io simila al la forlaso de la gepatra domo por studi ĉe la universitato. Unu plano estis prezentita kaj akceptita de ĉiuj ni per kiu ni konsentis forlasi la ĉeeston de nia Ĉiela Patro por sperti la surteran vivon.

Du gravaj aferoj atendis nin kiam ni envenis la mondon. Unue, ni ricevis mortkapablan korpon, kreitan laŭ la bildo de Dio. Per ĝi, per ĝusta kontrolo, ni kapablas ricevi eternajn vivon kaj feliĉon. Due, ni devas elproviĝi tiamaniere, ke ni kresku laŭ forto kaj spirita povo.

Nu, ĉi tiu unua kialo estas mirinde grava, ĉar ĉi tiu korpo releviĝos kaj servos nin dum la eterneco.

Laŭ la akceptita plano, Adamo kaj Eva estis senditaj al la tero por esti niaj unuaj gepatroj. Ili povis prepari fizikajn korpojn por la spiritoj, kiuj atendas por eniri ĉi tiun vivon.

Estas provizite en niaj korpoj, kaj tio ĉi estas sankta, krea povo. Tio estas lumo, por tiel diri, kiu enhavas la povon por ekbruligi aliajn lumojn. Ĉi tiu donaco estu uzata nur kadre de la

sanktaj ligiloj de geedzeco. Per la uzado de ĉi tiu krea povo, fizikaj korpoj povas esti kreitaj, kiujn spiritoj povos eniri, kaj tiel estiĝi novan animon naskitan en ĉi tiun vivon.

Ĉi tiu povo estas bona. Ĝi kapablas krei kaj subteni familian vivon kaj en la familio ni trovas la fontojn de la feliĉo. Preskaŭ ĉiu persono, kiu naskiĝas, posedas ĉi tiun donacon. Ĝi estas sankta kaj signifoplena pova, kaj mi ripetas, miaj junaj amikoj, ĉi tiu povo esta bona.

Vi gejunuloj, kiel ĉiu alia filo aŭ filino de Adamo kaj Eva, posedas ĉi tiun povon.

La krea povo, aŭ mi diru, la naskigebleco ne estas sensignifa ero de la plano, ĝi estas la neforigebla esenco de ĝi. Sen ĝi, la plano ne povus antaŭeniri. Ĝia misuzo povas malantaŭenigi la planon.

Multe de la feliĉo, kiu venos al vi dum ĉi tiu vivo dependos de la maniero per kiu vi utiligos ĉi tiun sanktan krepovon. La fakto, ke vi gejunuloj kapablas fariĝi patroj kaj patrinoj, esta signife grava por vi.

Dum ĉi tiu povo disvolviĝos en vi, ĝi instigos vin serĉi kunulon kaj kapabligos vin ami lin kaj teni lin. Mi ripetas, la povo por agi dum la kreado de vivo estas sankta.

Iutage, vi rajtos havi vian propran familion. Per la uzado de ĉi tiu povo vi kapablos inviti infanojn loĝi kun vi - geknabetoj, viaj propraj mem idoj - kreitaj laŭ via propra bildo. Vi kapablos fondi hejmon; regno de povo kaj influo kaj ebleco. Ĉi tio kunportos gravan respondecon.

La krea povo enhavas fortajn dezirojn kaj instigojn. Vi jam ilin spertas per la ŝanĝiĝo de viaj sintenoj kaj interesoj. Dum la dek-kelkaj jaroj, preskaŭ senaverte knaboj kaj knabinoj fariĝas io nova kaj interesa. Vi rimarkos la ŝanĝiĝon de formo kaj vizaĝo en via propra korpo kaj en aliaj. Vi spertos la fruajn flustrojn de karna deziro.

Estis necese, ke ĉi tiu krea povo estu duflanka; unue ĝi estu forta, kaj due ĝi estu pli malpli konstanta. Ĉi tiu povo estu forta ĉar la plimulto de viroj serĉas aventuron. Sen la deviga persvado de ĉi tiuj sentoj, viroj estus malinklinaj akcepti la respondecon subteni hejmon kaj familion. Ĉi tiu povo ankaŭ estu kontanta, ĉar ĝi fariĝos la kunigilo de familia vivo.

Vi estas sufiĉe maturaj, mi kredas, por rimarki, ke en la bestoregno, kie ĉi tiu krea povo estas efemera kaj dumsezona, mankas la familia vivo.

Per la krea povo, la vivo daŭras. Mondo plena de elprovoj, timoj kaj malkontentigoj povas ŝanĝiĝi en regnon de espero kaj ĝojo kaj feliĉo. Ĉiufoje, kiam bebeto naskiĝas la mondo iel renoviĝas per senkulpeco.

Denove mi diras, la krea povo estas bona. Ĝi estas donaco de Dio nia Patro. En la ĝusta ekzercado de ĝi, ni plej efike povas alproksimiĝi al Li.

Ni rajtas posedi, laŭ malplia maniero, multe da tio, kion nia Ĉiela Patro posedas dum Li nin regas. Ne estas imagebla pli signifa lernejo aŭ elprovejo ol la hejmo.

Ĉu estas mirinde, ke en la Eklezio geedzeco tiom multe gravas? Ĉu vi komprenas kial via geedzeco, kiu liberigos ĉi tiujn povojn de kreado por via uzo, estu la plej zorgeme elplanita, la plej solene elkonsiderita paŝo de via vivo? Ĉu ni konsideru nekutima, ke la Sinjoro ordonis, ke temploj estu konstruataj kun la celo plenumi la geedzegan ceremonion?

Nu, estas aliaj aferoj, kiujn mi menciuj kiel averto. En la komenco estis unu inter ni, kiu ribelis kontraŭ la plano de nia Ĉiela Patro. Li ĵuris detrui kaj disrompi la planon.

Al li estis malpermesite ricevi fizikan korpon kaj li estis elĵetita - eterne limigita kaj nekapabla krei sian propran regnon. Li fariĝis satane ĵaluza. Li plene scias, ke la krea povo ne estas sensignifa ero de la plano, sed ĝi estas ĝia ŝlosilo.

Li scias, ke li kapablas vin tenti uzi ĉi tiun povon tro frue, aŭ iel ajn misuzi ĝin. Vi facile povus perdi la eblecon eterne progresi.

Li estas reala estaĵo de la nevidebla mondo. Lia povo estas granda. Li uzas ĝin por persvadi vin malobei la ordonojn, kiuj ŝirmas la sanktajn povojn de kreado.

En la pasinteco, li estis tro ruza por simple tenti per malica invito esti malĉasta. Li ruzege kviete tintis junulojn kaj maljunulojn malalte opinii pri la sanktaj povoj de kreado por malsanktigi ilin kaj banaligi tion, kio estas sankta kaj bela.

Liaj metodoj jam ŝanĝiĝas. Li nun pritraktas ĝin nur kiel satigendan apetiton. Li instruas, ke ne ekzistas respondeco kun ĉi tiu povo. Plezuro, li diras al vi, estas la sola celo.

Liaj diablecaj invitoj aperas sur afiŝtabuloj. Ili estas la temoj de ŝercoj kaj kanzonoj. Ili estas prezentitaj per la televido kaj sur la scenejo. Ili gapas al vi per preskaŭ ĉiu gazeto. Estas pornografiaĵoj. Malicaj, malĉastaj persvadoj por perversigi kaj misuzi la sanktan kreaĵon.

Vi vivas en socio, en kiu estas antaŭ vi konstante invito misuzi ĉi tiujn sanktajn povojn.

Mi volas konsili vin kaj mi volas, ke vi memoru miajn vortojn. Ne permesu, ke iu ajn tuŝu vian korpon, neniuj! Tiuj, kiuj diras al vi alimaniere, nur volas, ke vi kunportu ilian kulpon. Ni instruas, ke vi konservu vian senkulpecon. Turniĝu for de iu ajn, kiu persvadas vin eksperimenti kun ĉi tiuj vivodonaĵoj.

La fakton, ke tia peko estas populare akceptita, ne sufiĉas. La fakto, ke ambaŭ paroloj volonte konsentas ne sufiĉas. Imagi, ke ĝi estas normala elmondo de amo, ne sufiĉas por malmalbonigi ĝin.

La sola ĝusta uzo de ĉi tiu sankta povo estas per geedzeco. Neniam misuzo ĉi tiun povon.

Nu, junaj amikoj, mi diru al vi sobre kaj solene, ke Dio deklaris per nemiskompreneblaj vortoj, ke mizero kaj malfeliĉo estas la rezulto de malobeo al la ordonoj pri ĉasteco. "Malvirteco neniam estis feliĉo," (Alma 41:10) Ĉi tiuj ordonoj estas donitaj por gvidi ĉiuj Liajn infanojn en la uzado de ĉi tiu donaco.

Iutage, vi tenos infanetojn en la brakoj kaj scios, ke vi du agis kiel kunuloj kun nia Ĉiela Patro en la kreado de vivo. Ĉar la bebo apartenas al vi, vi tiam ĝin amos pli ol vin mem. Ĉi tiu sperto povas alveni, laŭ mia scio, nur per la nasko de viaj propraj infanoj aŭ per la nutrado de infanoj naskitaj de aliaj sed alproprigitaj per adopto.

Iu el vi eble ne spertos la benojn de geedzeco. Protektu, tamen, la sanktajn povojn de kreado, ĉar estos granda rekompenco, kiu apartenos al vi.

Per tio, ke vi amas iun alian pli ol vi mem, vi fariĝas vera kristano. Tiam vi scias, kiel nur kelkaj aliaj scias, kion signifas la vorto "Patro," kiel ĝi estas uzata en la Sanktaj Skriboj. Vi tiam kapablos senti iom de la amo kaj zorgo, kiujn Li sentas por ni.

Estas signifoplene, ke el ĉiuj titoloj de respekto kaj honoro kaj admiro, kiuj apartenas al Li, Dio mem, la plej alta el ĉiuj elektis esti alvokita per la simpla eldiro "Patro."

Protektu kaj gardu vian donacon. Via feliĉo dependas de tio. Eterna familia vivo nun nur en viaj anticipoj kaj sonĝoj atingeblas ĉar nia Ĉiela Patro donacis al vi la plej valoran donacon - la kreaĵon povon. Ĝi estas la ŝlosilo al la feliĉo. Tenu ĉi tiun donacon sankta kaj pura. Uzu ĝin nur kiel la Sinjoro direktis.

Li ne devas esti malica aŭ venĝema por ke la ĝusta puno akompanu la malobeon al la ordonoj. La ordonoj establiĝas per si mem. Krona gloro vin atendas se vi vivas taŭge. La perdo de la krono estos sufiĉa puno. Ofte ni estas punataj same per niaj pekoj kiel pro ili.

Mi certas, ke inter la aŭskultantaro estas pli ol unu persono, kiu jam falis en malobeon. Iuj el vi, mi certas, preskaŭ senkulpaj de la intenco sed persvaditaj pro la invitoj kaj tentoj, jam misuzis ĉi tiun povon.

Sciu do, miaj junaj amikoj, ke ekzistas glora puriga povo. Kaj vi povas esti puraj.

Se vi estas ekster la Eklezio, la interkonsento de baptiĝo en si mem signifas, interalie, purigadon kaj lavadon.

Por tiuj, kiuj estas membroj de la Eklezio, estas maniero, ne tute sendolora, sed certe ebla. Vi povas stari pura kaj senmakula antaŭ Li. La kulpo estos for kaj vi povos esti en konscienca paco. Vizitu vian Episkopon. Li posedas la purigan povon.

Poste, vi povos elkoni la planan, puran elmontron de ĉi tiuj povoj kaj la akompanantan feliĉon kaj ĝojon en virta geedzeco. Ĝustatempe, inter la ligiloj de geedzeco, vi povos cedi al tiuj sanktaj manifestaĵoj de amo, kies celo estas la genero de la vivo mem.

(Tradukita el "Why Stay Morally Clean". Uzita kun permeso de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj.)